
# MOMENTON!




PRINTEMPO**2003** **braziala**esperantista**junulara**organizo **BEJO**



**ĈIPAĜE** | JUNAJ ESPERANTISTOJ EN KOPENHAGO, POST LA IJK

# MOMENTON!

**#03 PRINTEMPO 2003** | PRIMAVERA 2003

Multaj el ni esperantistoj certe povas ĝui amikecojn faritajn ene de la E-komunumo - multaj, kompreneble, estigxintaj en renkontiĝoj de Esperanto. Kiu el ni partoprenis en e-aranĝo, sen lasi almenaŭ manplenon da bonaj memoraĵoj pri ĝi? Ĉiu kongreso estas oportuno por ĝui malnovajn amikecojn kaj por fari novajn. En tia etoso, ni komencas tiun ĉi 'Momenton'. Vi legos la taglibron de la 38a BKE en Belo Horizonte (23a BEJK, ŭaj!) kaj certe ĝuos nian specialan raporton el la ĉi-jara IJK de Svedio. Ĉi-eldone oni vojaĝas al Skandinavio kaj konatiĝas kun ĝiaj urboj, tradicioj kaj naturo.

Kaj ĉu vi jam demandis sin, kial vi lernis Esperanton? Kiuj estas viaj celoj rilate al ĝi? Tion ni demandis al niaj legantoj - vi certe rekonos kelkajn amikojn en niaj paĝoj... Kisetojn,

*Grazi.*



**REDAKTORO** | Graziely Fagundes, Pato Branco, Paraná
**ARTO kaj TEKSTO** | Rogério Borges Grilo, Barcelona, Hispanio
**TEKSTO** | Ísis Okabe Piton, Campinas, São Paulo
**REVIZIADO** | James R. Piton, Campinas, São Paulo
**DISTRIBUADO** | BEJO, fondita en 1967 (Landa Sekcio de TEJO ekde 1968).
Caixa Postal 1097 13001-970 Campinas, SP BRAZILO

MOMENTON > Kvarmonata revuo de BEJO. **momenton@esperanto.zzn.com**



# IJK!

## internacia junulara kongreso de esperanto 2003

Post kiam Litova Esperanto Junulara Ligo (LEJL) pro manko de homfortoj rezignis okazigi IJK-n en Litovio, SEJU (Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo) estis petita gastigi junularan kongreson en Svedio, ĉar Universala Kongreso okazos ankaŭ en tiu lando. SEJU akceptis la proponon kaj rezulte la kongreso okazis la 19-26an de Julio, 2003, en propra ejo de la movado - la Esperanto-domo en Lesjöfors.

Meze de la sveda arbaro, la kongresejo situis en belega naturo kun arbaroj, lagoj, montetoj kaj... alkoj! Eblis tie naĝi, kanui, pluki berojn, migri aŭ drezinveturi.

La ĉijara temo estis "Al Libera KulturO" ('ALKO'). Kadre de tiu temo okazis multaj interesaj prelegoj pri la plej diversaj temoj, ekzemple kulturo sen limoj, libera komunikado kaj virina liberiĝo.

Kiel kutime dum IJK okazis diversaj amuzaĵoj: ludoj, sportumado, sveda manĝado, ktp. Por la lernemuloj, okazis dumtage kursoj de la sveda lingvo, popolbrodaĵo kaj eĉ de la argentina tango!

---

**MALDEKSTRE|** KONCERTO DE DOLCXAMAR DUM IJK2003.
**REDAKTIS|** ROĜER BORĜES (PRI IJK, SVEDIO, DANIO, KAJ CHRISTIANIA)

# IJK > JUNE KAJ KUNE

**SE VI ANKORAŬ NE SCIAS** kio estas IJK, do el kiu planedo venas vi? Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) ĉiujare okazigas sian internacian kongreson (IJK), kiu estas manifestacio de la junulara komunumo kaj celas plifortigi la interkomprenon kaj amikecon inter junuloj de ĉiuj landoj.

Lastjare, IJK estis en Brazilo! Kun la temo "Lingvo, Kulturo kaj Oportunecoj" la kongreso okazis en Julio, en la urbo Pato Branco/PR. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 150 homoj, ĉefe el Ameriko kaj Eŭropo.

## "internacia

Sed verŝajne la plej amuzaj eventoj okazis dum la nokta programo.

Ekzemple, estis multaj filmoj kun subtitoloj en esperanto, kiel "Matrikso" aŭ "Lola Kuras". Kaj je la noktomeza suno, bone... ĉio povus okazi, nokte. Ekde la unua Nokta Arbara Aventuro, ĝis la lasta nedormebla vespero, oni faris kvin (!) noktojn da diskoteko, kaj ĝuis multaj koncertoj.

Kvankam la etosa duopo Jxomart & Natasxa, la folka Jonas Dalmose kaj la loka rokgrupo Hoodlights estis tute bonega, neniu surpasis Dolcxamar. Nun kun novaj bandanoj, la finna grupo sin montris multe pli vigla, kaj ĉiu en la publiko kantis kune ĝiaj ege konatajn kanzonojn ("Malbonulo", "Ĉu vi pretas?", "Pacman"...). Kaj ankaŭ la novaj kantoj bone funkciis, tiel ke post la prezentfino ili revenis je peto de la histeria aŭskultantaro...

**DEKSTRE|** KIARA LUDAS KUN SVEDA KATO APUD LA AMASLOGXEJO EN LESJÖFORS.


kareso”

# SVEDIO >>>
## MULTAJ NOVAJ SVEDOJ

SVEDIO ESTAS GRANDA LANDO - laŭ multaj aspektoj. Ĝi estas tiel longa, ke se oni renversus Svedion suden ĝi atingus la kalkanon de la Itala Boto!

De ĝiaj montoj, kamparoj kaj distinga kulturo de la Samea popolo el Laponio, ĝis la senfinaj arbaroj, lagoj kaj folkloro de Meza Svedio, estas grandega diverseco inter la diversaj partoj de tiu vasta lando.

Fakte, pli ol duono de la surfaco de Svedio estas kovrita de arbaro, plejparte konifera arbaro kun riĉa bestaro. La granda lando havas malgrandan loĝantaron, ĉ. naŭ milionojn. 85 procentoj de la enloĝantoj loĝas en la suda duono de Svedio kun granda koncentriĝo en tri urboj: la ĉefurbo Stokholmo (1,7 milionoj kun antaŭurboj), Gotenburgo (kie okazis UK2003) kaj Malmö.

Svedio longtempe estis etne homogena lando. Antaŭ la komenciĝo de la dua mondmilito la sameoj estis la unununura, klare difinita malplimulto en la lando. Hodiaŭ ĉ. 20 procentoj de la loĝantoj havas eksterlandan devenon, tiel ke ili aŭ naskiĝis ekster Svedio aŭ minimume la patro aŭ la patrino naskiĝis eksterlande. Nur dum kaj post la dua mondmilito la enmigro pligrandigis. Svedio akceptis grandan nombron da rifuĝintoj dum la militaj jaroj kaj ankaŭ poste malfermis siajn limojn dum politikaj krizoj en aliaj landoj. Nur en 1992 estis akceptitaj 84,000 homoj, la plejmulto el eksa Jugoslavio.

**FONTO** | VIKIPEDIO.COM, LA LIBERA ENCIKLOPEDIO (LAU SENKOPIRAJTAJ INFORMOJ DE SVEDA INSTITUTO).



La ŝveda lingvo apartenas al la norda grupo de la germana lingva familio kune kun la norvega, dana, islanda kaj feroa lingvoj. En Finnlando, kiu dum sescent jaroj estis parto de Svedio, 300 000 homoj parolas la ŝvedan kiel gepatran lingvon. En la 16a jarcento Svedio nuligis la rilatojn al la romkatolika eklezio kaj dum pli ol kvar jarcentoj havis evangelian luteranan ŝtatan eklezion. La 1an de januaro 2000 la Sveda eklezio sendependiĝis kaj egaliĝis al aliaj kongregacioj. En 1999 apartenis al la Sveda eklezio 84 procentoj de la loĝantaro.

**SUPRE** | TIPA SVEDA DOMO. LESJÖFORS, SVEDIO.

**landoj** | países





Grandskala socialzorga sistemo dum longa tempo donis al Svedio altan profilon en la internacia debato. Svedoj povis atendi subtenon en la plej multaj sortoŝanĝoj de la vivo. La ekonomia krizo de la lando en la 90-aj jaroj devigis la ŝtaton . ŝpari, sed kelkaj el la forigitaj socialaj rajtoj refunkciis kiam la ŝtataj financoj reekvilibriĝis. La kreskanta onô da pensiuloj en la loĝantaro kaŭzas ekonomiajn problemojn en Svedio – la meznombra aĝo kreskis al 76,7 por viroj kaj 81,8 por virinoj.

Post la balotado en 1998 42,7 procentoj el la parlamentanoj estas virinoj kaj en la komenciĝo de 2000 virinoj formis la plejmulton en la registaro. En la politika sfero Svedio povas nomi sin monda ĉampiono koncerne la egalecon inter la seksoj. La familia politiko akcelas la eblecojn de ambaŭ gepatroj kombini profesian laboron kun komuna respondeco pri la infanoj.

**SUPRE** | VIKINGA ŜIPO VELAS TRA SVEDA KANALO
**MALDEKSTRE** | TURO EL LA URBODOMO DE STOKHOLMO ("STADSHUSET")

# DANIO >>>
## LANDO DE REĜOJ

Oficiale "Dana Regxlando" (Dane *Kongeriget Danmark*), Danio estas konstitucia monarkio en norda Eŭropo, kaj la plej malgranda el la Skandinavaj landoj. Ĝi konsistas el duoninsulo nomata "Jutlando", de arkipelago kun pli ol 500 insuloj, kaj el Groenlando (Verda Lando).

La historiaj devenoj de Danio perdiĝas en la skandinavaj legendoj, kiuj rakontas pri la aventuroj de nomadaj ĉasistoj, malsataj laboruloj kaj konkerantoj venintaj el la Nordo kaj la la Oriento. La Vikingoj, pere de serio de surteraj ekzpedicioj kaj maraj aventuroj, fondis reĝlandojn en Flandrio, Rusio, Britio kaj eĉ en Francio.

Post jarcentoj, dum Brazilo apenaŭ estis malkovrita de Cabral, en Danio la reĝeco, la burĝaro kaj la ekleziularo jam havis siajn disputojn, je civilaj militoj kiu kulminis je la fermo de katolikaj monaĥejoj kaj establo de Luteranismo. Ĉiukaze je la restarigo de la paco, renaskiĝis la prospero. Sub la reĝado de Kristian IV (1588-1648), la ekonomia evoluo plibeligis la landon, kun novaj havenoj kaj reĝaj ŝipoj, monumentoj, palacoj kaj apero de la Borso de Kopenhago. Sed la reĝo faris eraron: li decidis partopreni en la Milito de la Tridek Jaroj, en kiu la Dana malvenko estis plena kaj la lando estis invadita multfoje de Svedio. Nur en 1797, kun la adopto de la libera kurzo kaj la kampara reformo, la dana ekonomio denove kreskis, apogante sin en la granda mara komerco de spicoj.


**DEKSTRE** | NYHAVM (NOVA BOATHAVENO)



Konsiderata tre disvolviĝinta rilate al naturmedia planado kaj monda naturmedia aktivismo, Danio estas ankaŭ gvidanta lando en kontrolo de purigado, kaj estis la unua industrilando kiu starigis ministerion por naturmedio. Komerca aktiveco estas strikte regulata por gardi la naturan kaj historian valoron de la pejzaĝo. Ĉirkaux 30% de la landaj akvofaloj situas en protektitaj areoj.

Danio kreis konvencion pri siaj akvaj regionoj kaj tiu antaŭgardas multajn partojn de sia geografio, kiel la grandega tundra rezervo en Groenlando. Aliaj internaciaj naturmediaj interkonsentoj inkluzivas aermalpurigon, biodiversecon, klimatan ŝanĝon, endanĝerajn speciojn, riskajn forĵetaĵojn, maran rubon, la ozonan tavolon, ŝipan malpurigon, tropikan lignon kaj balenĉasadon.

# CHRISTIANIA >
## LIBERA LANDO?



LA HISTORIO de Christiania (kvartalo de Kopenhago, en Danio) estas longa, kun multaj bataloj, venkoj kaj malvenkoj. Multaj el la homoj kiu komencis ĝin jam ne plu vivas tie, sed iliaj revoj de lando libera kaj la ideo de urbo regada de siaj propraj loĝantoj daŭras.

Ĉio komenciĝis en la 70aj, kiam grupo de hipioj kaj alternativuloj transloĝiĝis al tiu parto de Kopenhago, kaj kreis alternativan vivon bazitan sur komuna vivo kaj libereco.

Unu el ĝiaj fundamentoj estas ekologio, prioritante natura manĝado, reciklado kaj la suna energio. Arkitektoj kaj sociologoj el la tuta mondo kutime vojaĝas al Christiania por studi la lokon.

Sed la polemiko serpentumas "Pusherstreet", la strato en kiu foti estas malpermesate. En tiu areo, oni povas aĉeti ĉiajn (mildajn) drogojn, kaj cxe la kafejoj /trikejoj de la ĉirkaŭaĵo, oni 'rajtas' konsumi ilin, tute kontraŭ la leĝoj de Danio.

Pro tio, la polico kaj la registaro periode intencas fermi la zonon, sed dum pli ol 30 jaroj la loĝantoj rezistis kune, kunlaborante unu kun la aliaj. Christiania do iĝis politika afero kiu eventuale iris ĝis la Parlamento, kie ĝi finfine estis enklasigita kiel "socia eksperimento".

La plej ironian aferon, nur homoj kiu tie estis povas ĝui. Kiam oni foriras el Christiania, la libera lando ("Freetown"), legeblas sur tabulo: "Vi nun eniras Eŭropan Union".




**SUPRE** | ENIREJO POR CHRISTIANIA, DANIO



ĈIPAĜE | ANĜELO ĈE PARKO "LANGELINIE" EN KOPENHAGO.
DEKSTRE | POEMO DE ANETA UBIK (PL) PREZENTITA DUM UK EN GOTEMBURGO.

# "KVARONMINUTO"

*Aneta Ubik*

Nokto.
Krepusko.
Mateno.

[09:27.45] Unue vekiĝas nazo.
Akra purigodoro, desinfektanta larmigante!

[09:27.47] Miksiĝas kun milda floraromo,
penetrinta dómajn vandojn,
fonto: sinteza åldonajo en bankuva akvo.

[09:27:49] m a l p r o k s i m e, mallaŭte...
monotona melodio almozuła mokas.

[09:27:51] Laŭtiĝas voĉoj, lingvoj lerte lernataj,
lispataj - lukse misuzataj -
elfluantaj kiel liberiga lakso.

[09:27:53] Hieraŭa ĉokolada fonduo, plej bona
kun bananoj kaj plensukaj persikoj.

[09:27:55] Subite okuloj malfermiĝas,
blindiga lumo enpafas. Ĉu sonĝo? - Mi

[09:27:57] respeguliĝas en aperinta sapveziko.
Kun febla floraromo.
Ekmiro.

[09:27:59] Paf! Silento.
Pura atento.

[09:28:00]

# JUNULARA ENKETO >>>
## LA VOĈO DE NIA POPOLO

**De kiom da tempo vi parolas Esperanton?**
"Ĉirkaŭ 2 jaroj. Per libreto, kiun mia frato portis hejmen, antaŭ multaj jaroj."
"Plimalpli 4 jarojn. Kiam mi eniris en la teatra grupo."
"Ekde 1997, do, jam de 6 jaroj. Mi konis per la Spiritisma Centro Bezerra de Menezes, kiun mi frekventis, tie estas Esperanta Grupo Adolfo Bezerra de Menezes, kie mi lernis."

**TTT-ejoj, kiujn vi kutimas viziti?**
"Nuntempe mi vizitas Gxangalo.com"
"Multajn, mi ne memoras nun."
"Mian www.lujz.org, kaj la kurson de KCE www.esperanto.cc"
"www.canalesperanto.kit.net (kompreneble, mi faras ĝin!)"

**Kion Esperanto signifas al vi?**
"Eblecon plibonigi la mondon, koni homojn, kiuj interesiĝas pri kulturo, pri bona babilado, kiuj ŝatas la diversecon kaj amas koni novajn amikojn."
"Bone, mi vidas ĝin kiel ĉefe la okazon por ke oni diskonigu la lingvon al la mondo kaj pruvu ke eblas esti internacia lingvo sen mono meze."
"Sufiĉe utila kaj viva."
"Esperanto piediras malrapide, sed pli bone, kun malpli da eraroj."
"Ni devas labori pli, nuntempe estas la momento!"
"Ĝi estas bebo!"

**Respondis:**
Cassius Desconsi, Brasilia/DF
Danielle Silva, Botucatu/SP
Ederson Ribeiro, Franca/SP
Felipe Queiroz, Santos/SP
Isis Okabe Piton, Campinas/SP
Luiz Portella, Porto Alegre/RS
Rogener Pavinski, Riberao/SP
kaj aliaj geamikoj...

**RAPORTIS** | ROGENER PAVINSK (RIBEIRAO PRETO/SP)

## KINE >

### LESJÖFORS, IJK '03

Hokan Lundberg, projektkunordiganto de "Dek", filmo pri aferoj kaj homoj rilataj al Esperanto. Estos 10 demandoj, 10 homoj, 10 landoj, 10 situacioj kaj 10 kanzonoj, ĉio en Esperanto, kun subtitoloj. Ni atendas la filmon!



## FRATINE >

### LESJÖFORS, IJK '03


Aldona kaj Aneta Ubik estas denaskulinoj - ilia gepatra lingvo estas Esperanto, kaj atentu ĉar eĉ siaj nomoj mem estas jam en la internacia lingvo. Aneta ekde Decembro vivos dum ses monatoj en Bona Espero, Brazilo.




## SENFINE >

### LESJÖFORS, IJK '03

DĴ Jan Schroeder kaj DĴ Roĝer Borĝes amuzis la homojn dum kvin noktoj da diskoteko. Ili starigis mondan rekordon el la plej longa "La Bambo"-sekvenco: 12 malsamaj versioj de la oficiala IJK-kanto!





Alveninte al Lesjöfors, ni nur volis manĝi ion, kaj ni tuj konstatis ke sveda kuirarto estas tre bongusta. Post la manĝo mi volis iom ripozi, sed tio ne okazis, ĉar Jomart kaj Nataŝa prezentis koncerton de rusaj kanzonoj. Post la koncerto oni renkontis konatajn samideanojn kaj eniris kun ili la gufujon (teĉambro). Kiam mi finfine enlitiĝis, la aliaj jam dormis delonge...

La postan matenon mi kurioze vekiĝis kiel unua (verŝajne tion kaŭzis la heleco, ĉar en Svedio la somernokto daŭras nur 3 horojn, pli norde eĉ nur 10 minutojn). Pro malokazo de sveda lingvokurso, mi spontanee esploriŝ la ĉirkauajon. Tie mi bedaŭrinde konatiĝis kun la lokaj kuloj, kiuj ŝajne arde saŭdadas min. Mi revenis: estis *svingodanco* kaj tiu estis mia preferata programaĵo. Post kvar dancleciono j, mi jam povis danci 12 diversajn figurojn!

Postvespermanĝe okazis la improvizita teatro de nederlandano. Lia prezento estis tamen tiel malbona, ke oni forprenis liajn ilojn por daŭrigi. En la diskejo, DJ Roger aŭdigis muzikon; kineje, prezentiĝis "Que sera, sera", kaj en la gufujo oni povis babili kun la aliaj homoj pri la estonteco de homaro...

Merkredo estis ekskursa tago, je kiu oni povis elekti inter drezinveturo (biciklo sur reloj), vizito al la plej proksima urbo kaj promeno en la ĉirkaŭaĵo. Oni tamen povis ankaŭ resti en la ejo kaj ripozi, precize tiun varianton mi preferis. Nokte okazis la Nacia Vespero, regiona dancensemblo prezentiĝis kun tipaj svedaj vestoj. Ilia meznombra aĝo estis trans la sesdeko(!), tamen la danco daŭris tri kvaronajn horojn.

La kulmino de la sekvanta tago estis la koncertoj de Dolcxamar kaj de loka "mortmetala" rokgrupo. En la kinejo estis montrata "La vojaĝo de Ĉihiro", japana komiksofilmo.

En la lasta tago la etoso estis tre trista, ĉar ĉiu sciis, ke ĝi fakte estas la lasta tago kaj oni multajn geamikojn verŝajne ne baldaŭ rerenkontos. Do dum la fina Internacia Vespero, aktoroj prezentis diversajn skeĉojn, kanzonojn kaj poemojn, reklamante la venontan IJK en Rusio, dum kiu ni esperebl ĉiuj denove renkontiĝos.

# UK >>>




Mi amas vojaĝi, viziti eksterajn landojn, ekkoni novajn homojn, aŭskulti kaj paroli diversajn lingvojn kaj Esperanto ĉion ĉi permesas al mi. Certe komence mi estis iom zorganta.... ĉu eble iu ne aprezos min en Gotemburgo? Komence mi sentiĝis perdita: la loko estis tre granda kaj ĉeestis centoj da homoj, sed sufiĉis malmulta tempo por adaptiĝi al tiu stranga kaj internacia etoso.

La plej interesa aspekto por mi, juna scivolema knabino, estis aŭdi homojn el diversaj landoj paroli Esperante. Ĉiuj kun malsamaj akĉentoj, ĉiuj kun malsamaj ritmoj kaj tonoj, kaj aparte ĉiuj kun malsamaj ridadoj! Mi amas aŭdi homojn ridantajn!

Mi partoprenis en diversaj kunsidoj pri fakaj grupoj, kiel ateistoj, filozofoj kaj koncerne al la socia forumo, sed pli allogaj estis aliaj aranĝoj kiel la nacia vespero, per kiu mi povis kompreni iom pli pri sveda historio, la koncerto de Esperanto Desperado, la piana koncerto de rusa knabo (bravega!) kaj la solena fermo. Tiu ĉi lasta estas memorinda ĉar oni atingis la konkludojn de la kongreso kaj pro la ĉeesto de infanoj el diversaj landoj kiuj poeziis Esperante.

Menciinda estas ankaŭ la ekskursoj. Ni vizitis bonegan fromaĝejon kie ni gustumis diversajn specojn, kaj poste ni eniris monaĥejon kaj antikvajn preĝejojn.



Ne forgeseblas tiu ĉi sperto pro la vivo ekster kongresejo. Mi komprenis, ke mi multe ŝatas nordulojn ĉar ili estas iom kiel mi... iom ferma karaktero tamen gentilaj kaj disponemaj. Kun amikino ni trairis la urbon, muzeojn, ludparkon kaj klopodis iĝi familia al la sveda lingvo, sed ĝi estas tro malsama el nia varma kaj flua parolmaniero!


Mi ŝatis malkovri la noktan vivon kaj la fruan sunsupreniron: je la kvara estis plena tago! Mi revenis hejmen riĉigita kaj mi tute dankas al IABE kaj ESPERANTO!

**UK** | VERKIS BARBARA (IT), EL IABE (INTERNACIA ASOCIO POR BLINDAJ ESPERANTISTOJ)
**IJK** | VERKIS OLIVER LOOSE (DE). LI ESTAS LA ULO KIU APERAS EN NIA KOVRILO




La Tero revolviĝas en sia orbito kaj dum somero la Norda Poluso pintas al la suno. Rezulte, estas certa jarperiodo en kiu la suno neniam sinkas sub la horizonto kaj la ĉielo estas luma dum dudek kvar horoj.

# LA NOKTOMEZA SUNO



En vintro la situacio estas precize mala. La suno neniam aperas supre la horizonto kaj ĉiuj regionoj de Skandinavio norde de la Arkta Cirklo spertas longan polusan nokton. En Tromso, tiu periodo de mallumo daŭras de la 27a de Novembro ĝis la 15a de Januaro, kaj la Noktomeza Suno videblas inter la 20a de Majo kaj la 22a de Julio.



BILDO | LA ETA SIRENO, SIMBOLO DE KOPENHAGO



SPECIALA RAPORTO: **2003**

# DIÁRIO do KONGRESO

Dum pasintaj Esperanto-renkontiĝoj taglibroj estis verkitaj de Roĝer Borĝes kaj tiu ekigis tradicion.

Por la lasta Brazila Kongreso de Esperanto tiu agrabla tasko estis transprenita de Rogener Pavinski, kunlaboranto de tiu ĉi Speciala Raporto de *Momenton!*, por ne lasi tiel bonan okazaĵon pasi senatente.


Ĉijara BKE lokiĝis en la Minasa ĉefurbo Belo Horizonte, kaj la kongresejo fariĝis *Sesc Venda Nova* - granda, arboplena kaj bela.

La celo de ĉi tiu taglibro ne estas rakonti pri E-movadaj diskutoj, decidoj ktp. Mi avertas, ke multo ĉi tie estas nur amuzaĵo kaj mi antaŭe sincere pardonpetas kaze de ofendiĝo.

Oni sekvu la "taglibrajn fundamentojn": skribi neformale kaj surbaze de persona vidpunkto. *"Ô trem bão, sô!"*

## **tago: Lando de Amo |** dimanĉo, la 20-a de Julio

Nia buso estis unu el la unuaj alvenintaj. Ni alvenis frue, la tutan dimanĉon oni akceptis partoprenantojn. Do, preni la tekon, meti identigilon, kontroli la programon estas kvazaŭ religia kutimo. Mi devas konfesi ke, antaŭ alveni mi kredis ke la kongreso ne estos tiom bona. Granda miso. Ĵus rigardinte la programon, surpriziĝis ne nur mi, sed multaj. Eĉ BEJO, kiu nenion planis, havis programerojn. Vere interesaj prelegoj pri pluraj fakaj temoj abundis. Krome, por la granda plejmulto de la junularo ne tiom gravas la prelegoj, movadaj diskutoj, sed pleje la juneca kaj amika etoso. Mi ege ŝatis la paperujon kaj la broĉon, kiun mi gajnis. Kuriozaĵo estis la reklamiloj pri "Viagra" medikamento, kiun oni enmetis la tekojn. Tiam mi memoris ke dum IJK oni metis kondomojn en niajn tekojn. Kial do "Viagra" nun? Oni tuj malkovris ke la decido kuŝis sur la kalkulo de la averaĝa aĝo de Esperantistoj. Kial doni kondomojn al kiuj ne uzas? Prava decido.



Iom post iom alvenis la esperantistaro, kaj kiel kutime, la nepra krokodilaro, kiu mezuras kiel marŝas la intereso pri Esperanto. Mi trovis mian komunan loĝejon, kiu troviĝis antaŭ la restoracio dume multaj estis ege for - avantaĝo, mi povis vekiĝi, eksalti kaj matenmanĝi. Krome, resti en komuna logejo estas vere unika sperto en kongresoj, ĉu ne? Kiom da malsimilaj homoj konatiĝas en la "komuna"? Bedaŭrinde oni ankoraŭ ne miksas virojn kaj virinojn en komunaj logejoj. Jen afero priplendinda! (Sugesto: Laŭ la aĝo!)

Ene de la komuna mi konis la fotiston de *"Brazila Esperantisto"*: Emerson Werneck. La ulo kiu havas amuzan ridadon : 'Ha-Ha-Ha'. Mi preskaŭ vidis larmojn el liaj okuloj kiam mi rekonis lin kunlaboranto kaj fotisto de la revuo. Li ne kredis ke iu rimarkus tion. Eble mi estis la unua. Do, mi petas al ĉiuj, sendu gratulan mesaĝon al li: bel@esperanto.com.br. Kontribuu al la kampanjo "Feliĉigu unu esperantiston".

Iom poste ni konis la "proksimkoncepton" de la Minasanoj. Oni sendis nin preskaŭ al alia urbo, por trovi bankaŭtomaton. Post renkontiĝi kun la neto de la junulara movado en la restoracio, ni havis agrablan surprizon, kiam ĉe la enirejo de la administrejo de Sesc, Molina, el Campinas skuis mian brakon, ekkriis: -"Aaaaaaah" kaj poste

elbuŝiĝis strangajn sonojn: *"k..ckc...bkbj..hosu..nei"*. Mi pensis ke ŝi suferis koratakon, sed ŝi sukcesis montri kaj paroli: -"Neil !". Nur tiam mi sukcesis kompreni kaj ĉiuj ni surpriziĝis, ĉar temis pri Usonano ege amuzema, kiun ni konis dum IJK kaj ĵus alvenis por partopreni la kongreson.

Jen la horo de solena malfermo, kies gvidanto havis parolmanieron similan al tiuj de radistaciaj prezentistoj (eble tiel parolante, li allogas multajn inojn). Por reprezenti BEJO-n, kies estraro entute mankis sen antaŭa averto (krom la sekretariino, kiu fakte laboras kaj ne povis ĉeesti pro la eteco de la ĵusnaskita bebo), ĉe la solena malfermo kaj por sidiĝi ĉe la tablo, oni elektis Rafael Lins, el Salvadoro-BA. Ĉu la plej taŭga decido? Malfacilas diri, sed oni facile povas aserti ke, ĉe la tablo, inter gravaj reprezentantoj kaj eminentuloj de la nacia movado, tiu Bahiano estis la ĉefrolulo. Unue li estis aplombe aplaŭdita je la alvoko de lia nomo por ĉetabligi (kompreneble, estis ĉio antaŭkombinita inter la gejunuloj). Due, ĉar dum ĉiuj aliaj uzis kompleton, li supreniris la podion uzante ĉemizon de piedpilka teamo (fakte, li nur uzis tiajn ĉemizojn dum la kongreso, kun la senkulpigo ke ili malmultekostas). Kaj fine, ĉar liaj salutvortoj konsistis el salutoj al la partoprenantoj, al gejunuloj kaj ĉefe, al lia "paĉjo": "- Paĉjo, mi amas vin!" li malsupreniris, trairis la tutan salonon kaj brakumis la paĉjon! Tiam denove li estis aplaudita, sed de la tuta ĉeestantaro. (Poste mi sciis ke ĉio ĉi, estis nura fia ago por delogi "paĉjon" vendi la hepaton por aĉeti duonon de la libroservo por la "amata filo")

Dum la malfermo, prezentiĝis teatra grupo de 'Lar Fabiano de Cristo', kiu verŝajne, favoras al reformoj en la Lingvo de Zamenhof. Ili montris banderolon, sur kiu legeblis la vorto 'Presentaz". Poste, la organizado de la kongreso montriĝis E-fika, ĉar taŭge metis tiun prezentadon ĉe la malfermo, kiam ni estis ekscititaj, ĉar male, ĉe la fermo, mi peze dormus. Poste ni havis kuriozan koktelon, kiu plej similis al "Supego", akompanata per la gitarludo de Markone Froes, de *Merlin*. La vico por preni la supon longis kilometrojn. Estis viditaj "flugantaj kuleroj" (jes ja, kuleroj, ne teleroj). Estis servita vegetarana supo kun kobalsa gusto. Bonvenon al Minasa kuirarto. Mi ne restis longe en tiu koktelo, precipe ĉar mi nenion manĝeblan havis (kaj ĉar min timigas flugantaj objektoj). Bonŝance mi portis saketon da matenmanĝ-cerealo, kiun mi gustumis dum mi promenis tra la kongresejo antaŭ ol enlitiĝi kredante ke mi povus ripozi de la laciga vojaĝo ĝis Belo-Horizonto.

## **tago: Matene kiam mi vekiĝas...** | Lundo, la 21-a de Julio

Alia granda miso mia estis kredi ke mi povus dormi trankvile kaj vekiĝi laŭvole. Ĉiuj scias ke, se oni venas al E-kongreso, fruan dormon oni ne havos, tio kompreneblas, sed mi ne estis preta por vekiĝi ĉirkaŭ la 6:30 ĈIUTAGE en la komuna loĝejo. Tie troviĝis kelkaj amikemaj maljunuloj, kiuj je la 6:00 matene (pli bone: FRUmatene) jam estis plene vekiĝintaj, lumŝaltite kaj babilantaj, (pli malbone: KROKODILE), kion eblas fari krom treni sin ĝis la duŝejo kaj provi duŝi sin por teni sin veka?

Post matenmanĝo, mi rimarkis ke oni programis por tiu mateno la kunvenon BEJO/BEL. Je la 8:30, krom mi, kiu havis akuratajn 'vekilojn', preskaŭ neniu junulo estis vekiĝinta por ĉeesti la kunvenon. Tiam mi ne atentis al tio kaj maltrafis la kunvenon, sed vizitis la libroservon, kiu estis ĵus muntita. Kelkaj junuloj provis partopreni la surmuran grimpadon, sed mi kaj Mateo el Ribeirão Preto rezignis unue ĉar la gvidanto ne aperis, due ĉar ni taksis la "ludon" kiel militistan trejnadon. Ni lasis tion por la 'verdaj soldatoj'.

Post la tagmanĝo, oni vidis ke la aktivecoj planita por BEJO ne ruliĝis tiel glate kiel oni esperis, precipe ĉar la gvidantoj de la aktivecoj NE parolis Esperanton! Ŝajne neniu el la programeroj okazis tiun tagon posttagmeze. Do kelkaj gejunuloj kunvenis kaj decidis preni sur sin la respondecon gvidi kelkajn aktivecojn. Tiam ni decidis ŝanĝi la tagon de la diskoteko, kiu okazus en la sama tago de la balo, merkrede, tiel apartigante la junulojn disde la cetero. Do la diskoteko ŝanĝiĝis al mardo, post la arta vespero, post la spektaklo de Merlin!

Vespermanĝinte, ni tuj ekiris al la arta vespero, kaj laŭ la programo ni spektus klavaran ludadon de la familio "Mattos" (Valéria, Rosa kaj Dinorah) el Rio de Janeiro. Sed la podion nur supreniris Rozinjo, kun klavaro, kiu plej similis al tiuj tekkomputiloj... sed, kaj la aliaj? Mi tuj komprenis: la fratino Dinorah respondecis pri disdonado de la paperoj kun la kanzontekstoj kaj Valéria zorgeme aplaudis la kantistinon. Jen la triopo. Ŝi, laŭ la junuloj: "sendis bone"... Poste, ni ĝuis la belegan voĉon de Neide Barros, kiu kantis kaj deklamis poemojn. Haroj eĉ hirtiĝis.

Alia tute senatenda surprizo okazis kiam la gvidanto de la arta vespero (la sama de la malfermo, kiu se ne laboras, devus labori ĉe radistacioj) demandis ĉu ni konas la repmuzikan stilon... ĉu? Unuj rigardis la aliajn... ĉu li? Jes, Antono, la repisto alvenis kaj komencis pafadi per siaj mitral-vortoj. La junularo iom hezitis, sed tuj alvenis kaj antaŭ kaj sur la podio por akompani lin. Li eĉ provis sed ne sukcesis

starigi la seriozemajn esperantistojn, kun la nova repo "kantu kune, kantu plu". Estis minimume amuze vidi s-inon Almada, el Santos-SP, kun la fingroj ene de la oreloj provanta ne aŭdi.



Post tiu "tohuvabohuo", ĉiuj denove trankviliĝis por spekti la spektaklon de la Minasa grupo "Minadouro", kiu ludas folkloran muzikon. Tiam mi eniris la ĉambreton de la sonteknikisto kaj helpis lin, zorgante pri la lumo de la spektaklo. Kelkaj ankoraŭ restis ĝis la 3-a matene antaŭ la restoracio, en eta placo, ludantaj gitaron kaj kantantaj, ĉar ĉiuj volis etendi kaj profiti maksimume tiun momenton. Mi silente eniris mian komunan, kredante ke ĉiuj jam estis delonge en profunda dormo. Laŭta ronko estis disaŭdata el unu el la 20 litoj. Subite, tuj post mi, eniris alia homo kun malgranda libro en la mano.

-"Mi ne sukcesas dormi" diris la kompatinda, kiu restis ekstere... legante libron! Mi ne malkovris el kies buŝo eliradis tiu ronko, tamen mi kondukis lin al Rodrigo Follador, el Kuritibo, kiu ankoraŭ estis en la placo, por kontroli ĉu vakis loko por tiu homo en lia dormo-ĉambro.

-"Kaj vi"? Li demandis pensante ke ankaŭ mi ne sukcesos dormi.

-"Tsc..tsc..." Li ne sciis ke mi jam estis alkutimiĝinta, li ne sciis pri la murtrema ronko de Assis en IJK. La Granda Mazi. Fakto estas ke en la posta mateno, al li nur mankis plori dankante nin du. - "Vi savis mian vivon".

## tago: Kio ajn, povas okazi kiam ajn | Mardo, la 22-a de Julio

En tiu mateno, mi decidis ke mi devus spekti almenaŭ unu prelegon. Do mi spektis tiun de D-ro Paulo Sérgio Viana, pri Genomo. Estis interese kiam li diris ke laŭ genetiko, la rasismo estas riproĉinda,

ĉar 99,99% de la genoj de la homoj estas egalaj. Do, kio pri la specismo, se inter ni kaj ĉimpanzo egalas 98 % el la genoj?

De genetiko al biciklo. Adriano Zukov estas el Salvadoro-BA, kaj vojaĝas al ĉiu brazila kongreso per biciklo. Li estas tre amuza homo. Li rakontis sian sperton pri vojaĝo al Europo kaj montris vidbendon kun fotoj faritaj dum tiu vojaĝo en 1989. Li rakontis, pri kiam altranga policisto en unu el tiuj danĝeraj landoj, en la epoko de la "fera kurteno" demandis lin angle: What's your work? [N.L.: pri kio vi laboras?] Li respondis esperante: -"Mi estas instruisto". Tia estas Esperantisto. Tiuj, kiuj preskaŭ mortas pro la lingvo.

Post la tagmanĝo ni ludis iomete E-kvizon. Rezigninte pri postkuro al la sonteknikisto por antaŭpretigi la diskotekon, mi akompanis Manuela-n, el Kuritibo, al stacidomo, por ke ŝi aĉetu busbileton. Iom poste, en la arta vespero al ŝi estis dediĉita kanzono, de la kantisto de samurba kaj debutanta grupo 'Magia Ŝuo'. La grupo ankaŭ "sendis bone", sed nur la kantisto estas esperantisto kaj la muzikistoj estis invititaj. Do, pli bone ke li, la kantisto, prezentiĝu kiel sola kantisto akompanata de la grupo. Tiu arta vespero estis superreala. Antaŭ "Magia Ŝuo", prezentiĝis Tarcizjo Lima, tre bone, sed bedaŭrinde nur li kaj sia gitaro. Kiom mi ŝatus spekti prezentadon lian akompane de bando! Je la horo de la "bis'!" , li hezitis reveni al la podio, ĉar li ne sciis ludi tiun, kiun la spektantaro petis. Senkulpigon al ĉiuj. Li ludis alian! Poste la spektantaro petis al la kantisto de 'Magia Ŝuo', prezenti la kunbandanojn: - "Ĉe la basgitaro....., hm....ĉe la basgitaro......mia amiko.....hum..... hej, kiel vi nomiĝas? Mi forgesis". Kia unuiĝo!

Sed la plej amuzan parton de la vespero, donis al ni *Merlin*, plej precize, "la alia kantisto de Merlin", Aldrin. Ĉio marŝis ege bone je la komenco de la prezentado: amaso da junuloj antaŭ la podio, bona sonkvalito. Kiam alvenis la horo, en kiu Idrin kantus "Nokta Trajnejo', li estis anoncita de Markone kiel la "alia kantisto de Merlin". Inter la kulisoj kaj la antaŭa parto de la podio, troviĝis fia elektra kablo, kiu malpermesis lian alvenon, ĉar li stumblegis kaj preskaŭ falis pro tiu kablo. Krome, li malŝaltis preskaŭ ĉiujn instrumentojn sur la spektaklejo. La junularo ne pardonis: "-Denove! Denove!". La prezentado de Merlin estis bonega. Je la "bis'!" fariĝis "vico-trajneto", kiu trakuris la tutan ejon, inter la seĝoj, ktp.

Kiu pensas ke post tiu arta vespero, ĉiuj dormos, tiu eraras. Ankoraŭ okazis diskoteko, en kiu mi provis meti la muzikaĵojn. Mi kredas ke la diskoteko estis vere bona, ĉar la loko estis ja dancejo, kun

bonega sonsistemo, lumo, trinkejo. Kaj la diskoteko estis 90% Esperanta. Multaj venis poste demandi min, kiuj muzikaĵoj estis tiuj, jen respondo: E-muziko!!! Je la 3-a mi ege laciĝis kaj foriris, dum kelkaj ankoraŭ babiladis en la dancejo.

## tago: Forglitas el la man'... | Merkrede, la 23-a de Julio

Ĉe la tabloj de la restoracio je la matenmanĝo jam kuradis la notico ke tiu grupeto da personoj, kiuj restis en la dancejo ne dormis kaj tranoktis petolante tra la tuta kongresejo. Temis pri Ariadene kaj ŝia grupo! Mi ne povis kredi je tio, kion oni rakontis al mi. Ili eniris en virajn dormĉambrojn, vekis ulojn, kiuj nur estis vestitaj per kalsonoj. Nekredeble!

Ĉe la Cseh-metodo de MiMa, mi konis la novan generacion de esperantistoj. Knaboj, kiuj preskaŭ ne scias saluti en esperanto sed konas pli da fivortoj kaj sakraĵoj ol la Prezidanto de la Akademio. Kompreneblas la kialo, ke ili estas admirantoj de *Dolcxamar*.

Mi finfine decidis malfermi la manon kaj elspezi iom da mono en la libroservo. Mi kaj Rafael Lins aĉetis la kontraŭfundamentajn revuojn de Arnau Torras, kies kelkaj pornografiaĵoj ruĝigas eĉ senhontajn esperantistojn. Nu, imagu kion ili farus al tiuj Esperantistoj de la "unuaj horoj"? Rilate al Lins, mi devas konfesi ke estis de li la plej interesa ideo de la kongreso, kiun imitis mi, kaj poste multaj aliaj. Sur la manĝtabloj estis paperaj kovriltukoj, kun verda stelo kaj E-citaĵoj. Ni faris el ĝi kongresan libron, sur kiu ni petis al aliaj subskribi. Do, nun ni havas interesan memoraĵon. Sur mia tuko, multaj skribis amikecajn mesaĝojn, krom la "stratvendisto" Rodrigo Follador, kiu nur kopiis alies mesaĝon (mi finfine malkovris, fuŝulo!). Dum la tuta merkredo, li provis vendi la plej kuriozajn aĵojn el Hindio: incensojn, broĉojn, esencojn, ŝlosilujojn, kondomojn ktp. Kaj li sukcesis. Kompreneble, kiam li komencas paroli pri la produktoj, ĉiuj aĉetas.

Menciindas ankaŭ la tablotenisa ludo, la instruoj pri salondanco kaj poste, la prezentado de la luktarto 'Kung-Fuo'. "Matrix" entute. Tre belaj movoj kaj dum la vera batalo, kiam ino luktis kontraŭ viro, ĉiuj ekkriis: "Knabino!! Knabino!!!" La majstro de la grupo iĝis tablo, por ke la luktistoj rompu brikojn sur li. Huj! Infanoj, ne faru tion hejme!

Poste, ni kuris al restoracio por vespermanĝi, ĉar je la 10-a estos balo. Do, la restoracio fermiĝos frue. Kiam komenciĝis la balo, mi iom hezitis eniri, unue ĉar ni restis ekstere babilantaj pri la kialo de la vivo.

Due, ĉar la etoso interne estis tre "maljuna". La bando estis ludanta muzikaĵojn kiel ekz: "Besame mucho". Nur poste, kiam la etoso juniĝis, ni eniris. Tio estos la lasta vespero, en kiu ni ĉiuj estas kune, do malgraŭ mia laceco kaj la bando, mi decidis resti. Nur kiam la bando eksonigis "kokritajn" muzikojn, mi ne eltenis kaj foriris iomete, pretigis mian valizon por la posta mateno, revenis kaj restis ĝis la fino, por ĝisi ĉiujn. Sed, multaj ne sukcesis ĝisi kaj, post la balo, restis ĉe la benkoj de la placo amuziĝante, aŭdante muzikojn... ĝuante la lastan nokton. Ĉar mia buso foriros je la 8-a matene al la urbo 'Ouro-Preto' mi preskaŭ neniun vidos en la mateno. Mi enlitiĝis je la 4-a.

## tago: La vivo iras plu... | Ĵaŭdo, la 24-a de Julio

Je la 7a matene mi estis devigita ellitiĝi por foriri, ni iros al la historia urbo Ouro-Preto. Mi pensis ke neniun mi vidos, tamen Ariádene kaj ŝia grupeto denove ne enlitiĝis kaj matenmanĝis kun pli bona mieno ol la mia, kiu nur dormis 3 horojn. Nu, fine mi enbusiĝis kaj atendis la ekveturon, jen ĉio por ĵaŭdo, mi ne partoprenis la fermon de la kongreso. Mi sekvis ĝis Ouro-Preto, sed antaŭe mi postlasis parton de mia feliĉo en tiu loko kaj en ĉiuj personoj kun kiuj mi kunestadis. Ne eblas rakonti ĉion, kio okazis en tiu ĉi kongreso, ne eblas transporti al papero ĉiujn ridadojn, ĉiujn rigardojn, ĉiujn amuzaĵojn, ktp. Kio enestas tie ĉi estas nur supraĵa ero da la tuto, kiu troviĝas ene de ĉiu el ni, kiu partoprenis. Ĉiu el ni havas sian propran vidpunkton, sian propran sperton. Mi ege feliĉas pro tio, ke mi konis homojn kiel vi (tiuj, kiuj subskribis mian "kogresan libron" ja scias pri kiuj temas), pro tio ke mi iom partoprenis en viaj vivoj, dividis kun vi miajn vivspertojn, kaj pro la denova oportuno renkonti la malnovajn kaj gravajn amikojn. Multaj amikoj pri kiuj mi sopiras ne povis ĉeesti. Tiu ĉi taglibro estas dediĉita al ili.

## Adiaŭa Tago... Elkorajn Dankojn.

*Rogener Pavinski,*
*la 28an de Julio, 2003*
*alkemiisto@pop.com.br*

ACCEMTON! Speciala suplemento de Printempo/2003